

OFICIALA ORGANO DE PROLET-ESPERANTISTA UNIO DE IBER-AMERIKAJ LANDOJ

II-a Epoko 2-a (5) JARO	REDAKTEJO - ADMINISTREJO Hospital, 54, pral. - Barcelono	BULTENO JANUARO 1936	SOCIA SIDEJO Cros, 4 - Barcelono (Sans)	Nr-o 3 (32)

La ĥaosa stato de la laborista esperantismo internacia

(Dediĉata al la II-a Kongreso de P.U.I.L.)

La internacia kaj nacia laborista movado estas profunde dispecigitaj, en momento kiam plej urĝas la fera unueco por la memdefendo kaj por la atako. Konsekvence je la disdivido de la laborista klaso, dum tiel kritikaj horoj, estas la ĥaosa stato en kiu disvolviĝas la proleta esperantismo.

Ni ekzamenu la esperantistan movadon, kiu tiel rekte trafas nin.

— 1 —

Neniu Kdo ignoras, ke ekzistas grava malsimilo inter la laborista esperantismo kaj la burĝa esperantismo, malĝuste nomita ĉi lasta "neŭtrala". La *neŭtrala* esperantismo estas tiel bone organizita de burĝaro, ke ĝi neniam atingis tiel firman unuecon kiel nun, nacie kaj internaciskale. Burĝaro strukturis nove *Universalan Esperantan Asocion,* ĉar per la nova organiza formo de U. E. A. la burĝecaj esperantistoj servas pli efike sian movadon, en plejebla alta grado; tie estas la kaŭzo, kie kuŝas la fiereco de la *neŭtralaj* esperantistoj el tuta la terglobuso, kiuj apartenas al UEA kaj al ĝia respektiva nacia organizaĵo, pro la sola faro esti grupigita ĉiu *"neŭtralulo"* en ia ajn esperantista neŭtrala societo el sia loĝloko.

Kompreneble, kelkaj *neŭtralaj* grupoj restis for el la vicoj de novigita U. E. A. (ne multaj, tamen). Tiujn nukleojn ni povis konstati diversloke en Hispanio kaj ni opinias, ke for el la duoninsulo okazas la samo. Ĉi tiuj grupoj multe suferas pro la internaj disputoj. Kie estas pli forta la burĝeca alo, la grupo faŝistiĝas rapide por evolui finfine al faŝistema U.E.A; kie la laboristeca alo havas pli da influo, la grupo rapide proletiĝas; trie, diversaj tiaj grupoj duoniĝas pro neebla kunvivo de la du aloj.

Fronte al esperantista movado de "neŭtralismo", kion starigis tiuj, kiuj apogas movadon specife proletecan? Ni ne forgesu, ke burĝaro estas la edukanto kolektiva de proletaro. Burĝaro senĉese instruas nin kaj indikas la vojon, kiun ni devas elekti lernante el ilia ekzemplo, sed ne por agi favore al burĝaro, sed inverse, kontraŭ ĝi.

— 2 —

La internacia esperantista movado de laborista klaso, hodiaŭ troviĝas en bedaŭrinda situo; ĝi eniĝis en ne elireblan straton, se tiu movado ne reagas zorge kaj akurate; se ĝi ne regrupiĝas grand kvante kaj intime, kiel decas, forgesante antikvajn malagrablaĵojn, forlasante kio dividas nin kaj serĉante kio ninpovas unuigi.

Antaŭ ĉio ne damandu al nia koro kaj al nia penso: Kia devas esti la rolo de la organizoj, pere kio kaj por kio ili ekzistas? Ĉiu organizaĵo havas siajn celojn. Niaj organizoj pretendas ĉiuj esti efikaj kaj utilaj al laborista klaso kaj al ĝia esperantismo. La tuta proleta esperantismo havas samajn celojn; kial, do,

esti ni mem la obstakloj por kunigi la energiojn de ĉiuj, se ni havas komunan programon: servi al proletaro kaj meti Esp.-on je la servo de proletaro por ĝia amancipiĝo klasa?

La internacia panoramo — kvankam feliĉe ŝajnas, ke ĝi ekreiras si an ĝustan vojon — prezentas al ni la jenajn esperantistajn internaciojn de laboristaro:

1. S. A. T.; 2. I. P. E.; 3. T. L. E. S.; 4. I. S. E.; kaj aliaj de fakuloj, profesiaj.

Tiuj organizoj ĉiuj duone vivas; ili konservas sian vivon, ĉefe pro la penoj de iliaj organizintoj; iliaj influo morala kaj materiala estas preskaŭ nepalpeblaj. Ĉiuj celas proksimume la samon: esti utilaj al laborista klaso, per uzo, subteno kaj disvastigo de internacia lingvo Esp. o meze de laboristaro.

Dividas laboristojn, ne iliaj interezoj, kiuj estas la samaj en tutmondo, sed la diversaj filozofia pozicio, kiun ĉiu organizita sektoro sekvas. —Ĝenerale personecaj antagonismoj rezultas el diverseco en ideologio kaj taktiko.

Ĉu ne eblas profiti ĉion kion ni komune celas por krei lojalan unuigon de la tuta nia esperanta movado en tutmondo, kaj ĉiuj kune kunlabori en unu solan esperantistan internacio de laboristaro esperantista? Ĉesu la aroganteco de unuj kaj de aliaj, kaj ni sentu nin pli respondecaj militantoj! Kiam ni estos pli saĝaj ol nun? Kiam ni forlasos nian pure azenan agadon? Ne plu ni brenisu nian fratan kaj intiman senton por la kuniĝo. Kio malhelpas nian alproksimiĝon? Kiajn obstaklojn venki? Kion fari? For nian memmortigan pasivan staton! Ni ne povas atendi plu, jam!

— 3 —

Ĉie la laborista movado apartenanta al diversaj politikaj kaj sindikataj internacioj re integras siajn apartajn movadojn en unu solan. Tio pleniĝas nian fratigan koron je nedifinebla ĝojo.

Ĉu laborista esperantistaro restos, antaŭ ĉi citita ekzemplo, tiel stulta kiel ĝis nun en gaja kaj riproĉinda reciproka atakado? Kune, nia movado esperanta atingos ĉion; dise, ni mizere perdas niajn energiojn; ni malkuraĝigas al multaj kaj fine ni ridigas niajn observantojn pro nia mikroskopa kapablo.

A TORALLOLA

Pri «disdialektiĝo» de nia lingvo

Ĉu esperanto disdialektiĝas aŭ disdialektiĝos? Jen la demando, kiun oni sufiĉe ofte aŭdas el novula buŝo ĉe nia poresperanta propagando. Kian valoron havas studado de lingvo internacia, se post dudek jaroj — aŭ eble eĉ pli frue! — ĝi disfalos en tiom da dialektoj kiom ekzistas nacioj? Tiaj konsideroj kelkfoje grave malhelpas nian propagandon, kaj eĉ kamaradoj interesiĝante je nia movado restas skeptikaj kaj dubemaj malgraŭ propa sperto aŭda, ĉar ili timas ke la uzado progresanta de esperanto, ĝia disvastiĝo inter nacioj pli kaj pli multnombraj disaliigos ĝian sonaron.

Eĉ homoj rilatante pli-malpli favore al nia movado, kiel la redaktoro de Viena "Laborista Gazeto", kiu raportis en la menciita ĵurnalo pri la Vienaj kongresaferoj, esprimas dubojn pri la stabileco de la esperanta sonaro.

Estas necese ekzameni tiun demandon. Kelke da historiaj pripensoj lumigos niajn esplorojn.

Esperanto estas produktaĵo de difinita historia epoko; ĝi estas nek infana ludaĵo, nek kreskaĵo hazarda, arbitra, nek nehistoria "deus ex machina". Mondlingvaj projektoj jam antaŭ 300 jaroj okupis la intereson de scienculoj. Famaj homoj, kiel Leibniz, revis pri disbato de lingvaj baroj. Sed iliaj projektoj estis utopiaĵoj. La klaso, kiu je tiu malproksima epoko bezonis kaj havis internaciajn rilatojn, estis la reganta klaso, posedanta ĉiujn materiajn kaj intelektajn riĉaĵojn de la socio. Ĝi por siaj internaciaj rilatoj ne bezonis artefaritan, speciale elpensitan lingvon; ĝi uzis kiel interkomprenigilo latinan, francan, hispanan lingvojn. Ĝi havis tempon kaj monon por akiri ilin.

Depost la naskiĝo de la kapitalista sociordo ĉio tio profunde ŝanĝiĝis. La industria disvolviĝo kaj la teknika progreso gigante kreskigis la produkciajn fortojn. La bezono vendi la fabrikitajn komercaĵojn, havigi al si malmultekostajn laborfortojn kaj novajn fontojn de naturriĉaĵoj, de krudmaterialoj, pelis la kapitalismon trans la tuta tero. Kaj ĉie kie enplantiĝis la moderna produktordo, ĝi konstruis ferajn vojojn, etendis kuprajn fadenojn, venkis marojn kaj montojn, malaperigis distancojn kaj spacojn per neimagebla forto. Popoloj, kiuj dum jarcentoj vivis malproksimege unu de la alia, konante sin nur per hazardaj militoj aŭ per migrado de metiistoj, per la kapitalista progreso subite fariĝis najbaroj. La internaciaj rilatoj ne estas plu afero nur de reganta klaso. La grandaj popolamasoj bezonas kaj havas rilatojn internaciajn pro profesiaj motivoj kaj proklasa intereso. Nur per kapitalista disvolviĝo fariĝis necese ke ĉiuj homoj sciu legi kaj skribi, ĉar fabrika, grandindustria produktado bezonas lertajn, instruitajn laboristojn. "La kapitalismo elŝiris la popolon el la idiotismo de la kampara vivo", diris Karl Marx.

Samtempe vekiĝis multnombro da nacioj, dormantaj ĝis tiam en nehistoria ekzisto. Novaj ŝtatoj naskiĝis, novaj, antaŭe nekonataj lingvoj de ĵus vekiĝintaj popoloj sonis sur la monda merkato.

Lingvo internacia, ĝis tiam hazarda, okaza ludaĵo, fariĝis tiel objektive necesa. Ne nur fakta ekzisto de mondekonomio, de tutmondaj

URĜAJ PROBLEMOJ

En la lasta numero de "Proleta Voĉo" oni tamburas pri la decido de la Ekzekutiva Komitato de P. U. I. L. organizi la II-an Kongreson de nia organizo. Delonge ni leziris tian kunvokon. Fine ni estas ıntaŭ ĝi.

Estu bonvenata ĉi tiu Kongreso! e, kiel asertas la E. K., ni trapais la periodon doktrinan por alvei en la organizan k. propagandan, ı kuniĝo de ĉiuj vigluloj ebligos tarigi la fundamentojn por tiuj faendaj taskoj. Ni konsentu, ke estas ere necese solvi kelkajn probleojn, kiuj ī- baras la disvolviĝon : nia organizo. Tio neniel povas ti tiel bone prizorgata kiel en ongresejo; k. jam nun mi prezens al ĉies konsideroj la probleojn, kiujn mi konsideras plej aıtindaj.

P. U. I. L. havas jam trijaran ektadon. Ĝi ja fariĝis tiu organizo ın ni bezonas k. por kiu ni bata-. Malfeliĉe la laboristaj organiestas ĉiam submetataj al la malilaĵoj, ne nur ekonomiaj, sed ani alispecaj. Tial nia agado ne estas peniga sed ofte malmulte ktodona. Nur per obstina volo, povas paŝi antaŭen. Vastigi, skigi nian organizon ni ja nepre onas. Kiel? Mi provu skizi niajn punktojn:

aboristoj-esperantistoj lingvoaj, kompetentaj, ne abundas. Vere multaj eklernis la lingvon, sed kiom da ili ellernis ĝin? Konsekvenco ei ĉi tio estas, ke la laboro ĉiam pezas sur la samaj dorsoj. k. plie nia anaro ne sufiĉe kreskas. Kiel prave diras "Ruĝa Esperantisto", organo de la britaj Kdoj — kiuj sentas kiel ni tiu domaĝan problemon — "la bonaj esperantistoj pli longe restas en niaj vicoj ol la malbonaj". Unue, do, oni devas "baki" bonajn esperantistojn. Sen firma fundamento, fundamento konsistanta el multnombraj Kdoj sufiĉe lingvolertaj k. kapablaj sukcese instrui la lingvon, kian laboron oni povas fari?

Tiucele, oni devas klopodi starigi superajn kursojn p o r estontaj kursgvidantoj. Mi jam scias, ke tio estas problemo malfacila, ĉar kompetentaj Kdoj ja ne abundas, sed mi ne konsideras la problemon tiom malfacilan por ke ĝi ne povu esti solvata sukcese. Mi opinias, ke ankaŭ "Proleta Voĉo" povus helpi per lingvistika paĝo, kiu pritraktus tiujn flankojn de la lingvo, kiuj, malgraŭ esti nenio mova, ofte restas ignorataj de lertaj esperantistoj Ni ankaŭ devas pripensi, ke oni ne povas deveni sperta lingvo-uzanto, se oni ne legas multe en nia lingvo; kaj kompreneble, sen libroj kaj ĵurnaloj, oni ne povas legi. Kiom da libroj esperantlingvaj havas via organizo?, demandu al kiu ajn kaj respondo estos ĉiam la sama: "Malmultajn", eĉ "neniun". Gramatikaj ekzercoj estas necesaj, sed legado estas pli necesa ankoraŭ. Oni, do, urĝe bezonas starigi libro-servon, kiu diskonigu nian literaturon al la lernatoj. Per tio ni trafos du paserojn per unu pafo : Ni plialtigos la esperanto-nivelon de niaj instruistuloj k. preparos ilin doktrine por klasaj celoj.

La manko de adekvataj lernolibroj estas alia grava problemo. Kiujn librojn ni havas por gvidi ĉu elementalan ĉu superan kursojn? La plej spertaj pedagogoj asertas, ke instrui lingvon pere de gramatiko estas pedagogia monstraĵo (1). Monstraĵo, kiu faras ke la tedo k. la lacigo segu tuj ĉe la instruituloj. Ĉu ne pripensigis vin la fakto, ke kutime pli ol la triono el la ĉeestantoj al la elementaj kursoj malaperas antaŭ ol ilia finiĝo?, k. nia organizo devas sin nutri el la instruituloj, ĉu ne? Pritraktante tiun temon sur la paĝoj de "La Torĉo de l'Edukistoj" Kdo Boubou saĝe elmontris kiel devus esti lernolibroj por elementaj kursoj por laboristoj. Tiun problemon mi konsideras plej grava k. la kongreso devos studi k. solvi ĝin. Ne estas ja nia intenco nun pledi por rekta aŭ malrekta metodo, por tiu aŭ ĉi tiu sistemo, sed nur reliefigi problemon, kiun ĉiu kursgvidanto pli aŭ malpli akute spertis.

"Proleta Voĉo" ankaŭ okupos nian atenton. Nia organo devas esti la vivanta esprimilo de la tuta. P. U. I. L.—movado ankaŭ. Mi opinias, ke ĉiu filio ĉiumonate devus sendi artikolon aŭ raporton pri la vivo de sia organizo. Ĉar ni jam scias ke tio estis proponita, sed neniu plenumas, oni devus studi ĉu oni povus devigi ĉiun filion fari tion. Kompreneble oni ne bezonas prelegojn, sed sufiĉus simplaj raportoj. Tiele oni vivigus nian organon, kiu ŝajnigas, anstataŭ esti la oficiala organo de laborista organizo, organon de kafeja rondeto. (1).

Mi ne povas ne mencii alian gravan aferon: "Ĝis hodiaŭ P. U. I. L. konsistas nur el filioj Katalunaj. La klopodoj faritaj ĉe la enlandaj esperanto-organizoj por altiri ties

---

ɪrrilatoj, ne nur nombro jam hoı tro granda da lernendaj ling- ne nur partopreno de la ndaj popolamasoj al la spirita ɔ kaj al la internaciaj rilatoj diĉas tiun necesecon, sed ankaŭ akto ke tiuj grandaj amasoj hanek tempon nek monon por akielke da fremdaj lingvoj.

iel historia realaĵo, havante deɔn kaj radikojn siajn en la evoɔ de mondekonomio, nature esnto dependas ankaŭ estante kaj ıte de la ekonomia kaj politika ɔlviĝo tutmonda.

(Daŭrigos)

Gek-doj! aĉetu

GRAMATIKON

Eldonitan de PUIL por fari elementalajn kursojn en niaj vicoj

Prezo ekzemplero: 1 pto.

Al la tuta proleta esperantistaro

Ĉi sube ni publikigas alvokon aperinta dum la postaj monatoj kiuj sekvis al la Oktobra Hispana Revolucio. . . . .

Ni represas ĝin ho diaŭ ĉar ni kredas ke en la nunaj momentoj, kiam la proletoj hispanoj ŝin pretas kontraŭbatali faŝismon, en nia lando, ĝi estos efika aktualaĵo, kiun ni profitas por sendi saluton al ĉiuj kamaradoj, kiuj enkarcerrigitaj suferas a krimulan leĝon de kapitalismo Red. .

sukcesa starigo de la glora Astura Respubliko de Laboristoj k. Kamparanoj, sange kaj krime sufokitaj pere de miksaĵo de maŭraj trupoj, korpuso de profesiaj krimuloj, kies oficiroj kelkaj servis en iamaj caraj kontraŭ sovetaj armeoj (Wrangel k. a.), civil, k. asaltgardistoj, soldatoj k. t. p.

La "miksaĵo" de tiom variaj elementoj pruvas, ke la faŝistiga registaro ne fidis je la soldatoj, kiuj *fakte* troviĝis inter du frontoj.

Ni profitu la historian lecionon, kiu donas al ni la Astura Revolucio. Niaj heroaj Kdoj el Asturio montris al la subpremata proletaro kiel ĝi devas kaj provas kapti la povon.

Multaj estis k. eble estos la viktinoj, inter kiuj ni citu: k-doj serĝento Vázquez k. Argüelles kiuj falis por la kaŭzo proleta, kovrante sin je gloro.

La prolet-esperantistoj ankaŭ plenigis la malliberejojn je proleta karno.

Inter ili, Kdoj Batista kaj Conesa el Barcelono kune kun 15 Kdoj pli, estis komdamnitaj je *30 jaroj* da malliberejpuno. Oni sendis ilin al fortikaĵo "San Cristobal" en Pamplono."

Kie estas koncentrigitaj ĉirkaŭ 2.000 Kdoj el Asturio kaj aliaj lokoj el Hispanio. Iliaj dormĉeloj estas situitaj je 25 metroj sub tera surfaco kaj estas sufiĉe malsekecaj. La kondiĉoj higienaj estas oportunaj por naski ĉiaspecajn malsanojn.

Malgraŭ Batista kaj Conesa kun granda entuziasmo pere de gramatiko de P. U. I. L. gvidas kurson de *Epto* al kelkaj kun grupoj de la la 2.000 kaptitoj el diversaj regionoj de Hispanio, kiuj multe interesiĝas pri la movado prolet-esperantista.

Kdoj Batista k. Conesa, daŭrigu vian kulturan laboradon kaj vi vi dos la fruktojn.

Niaflanke ankaŭ ni daŭrigos l nian ĝis kiam vi k. ĉiuj aliaj Kdoj estos elprenataj el la ungegoj el l buĉistoj kapitalistaj kaj tiam... n venĝos ĉiujn viktimojn falintajn.

Konsiderante la mankon de interligo pro tiu foresto de adekvata organo, kiun tiom deziras la kamaradoj el Iber-kaj Amerikaj Londoj, ni klopodos interrilatiĝi k.kontaktiĝi per eldono de ĉi proŝuso folieto, kun ĉiuj Kdoj sentantaj, la bezonon kaj orienti sin post lastatempaj bataloj de laboristaro en Hispanio, kiuj atingis plej altau kulminon en la simpation k. aliĝon, restis senefikaj. Tiun problemon la Kongresanoj ne povas preterlasi. Se ni vere deziras ke la nomo de nia organizo ne restu nur sur papere, ni devas direkti al tiu celo miajn klopodojn.

Jen unu vorton pli: Kritiko estas nepre necesa rimedo, por vivigi socion. Se supereternulo trovus kritikojn en nia artikolo, li kredu, ke nia nura intenco estas helpi la vivadon de nia organizo. FOKER

(1) Kontraŭe; neniam oni diskutas en la kafotrinkejoj alion ol banaloĵojn, politikaĵojn kaj cetere, sed ne tiel seriozajn kaj gravegajn aferojn, bedaŭrinde regataj de tre malmutaj laboristoj, se ni havas firman teorion, ni me posedos seriozan movadon kaj laboristaro neniam venkus, matesimume se ni pensas ke P. U. I. L. ne estas politika sed kultura asocio— Red.

Oficiala vivo

Kongresprokrasto

Ekzekutiva Komitato de P U I L decidis prokrasti la Kongreson pro eventuala balot periodo ĝis dato pli oportuna, kiun ni siatempe komunikos.

Samtempe E. K. decidis fari inviton por la Kongreso al ĉiuj gekamaradoj iberlingvaj el tutmondo, apartenantaj al plej diversaj laborist-internacioj de esperanta movado. Ankaŭ ni invitas al ties grupoj, kaj al la respektivaj Internacioj.

P U I L akceptas kongresproponojn el ĉiuj flankoj de respondecaj (organizitaj) kamaradoj, por ilin diskuti dum la kunvenoj. Ankaŭ povos okazi se necese fakaj kunsidoj dum la Kongreso.

E. K.

INFORMEJO DE P.U.I.L.
Strato Hospital, 54, pral. - BARCELONO

Ge-kamaradoj

Por via reaniĝo al P.U.I.L sendu la monon al Administrej
Strato Hospital, 54, pral.
Barcelon

TRE GRAVA PRESERARO

Sur la *novembra* n.° de *Prolet Voĉo* aperis plej diversaj preserar (malgraŭ la zorga provkorektad unu el kiuj esprimas la kontraŭa penson de la artikolverkinto. En artikolo de *Kdo Protono*, sur la 2 paĝo, 3.a Kolono, 3.a alineo aŭ paragrafo, oni legas:

"Ni opozu nenian kulturklasa movadon al tiu de burĝaro". An tataŭu la vorton "nenian" per ĉi ti alia "nian". Memkompreneble, supozas ke ĉiu en sia konscio ja korektis la malsaĝaĵon dum la l gado.

RED.